# KKPS 2013 jam plena!

Post la sukceso de la unua KlaĉKunveno PostSomera, kies lokoj jam estis plenigitaj du monatojn antaŭ la renkontiĝo, la organizantoj prepariĝis por oferti pli da spaco al ĉiuj aliĝintoj de la sekva jaro. Sed malgraŭ iliaj klopodoj jam nun, antaŭ la apero de kotizoj, aliĝilo aŭ eĉ retpaĝo, KKPS 2013 estas jam tute plena kaj ne povas akcepti pliajn aliĝintojn.




*La amaso da aliĝintoj superis ĉies atendojn, eĉ de Koko Poso.*

## Atendlisto kreita

Por tamen ne bedaŭrigi interesiĝantojn la organizantoj de KKPS decidis starigi atendliston. Kiam estos malaliĝoj aŭ estos trovita plia spaco, tiam la atendantoj ricevos mesaĝon kaj povas konfirmi sian aliĝon. Por tio skribu sube viajn datumojn kaj donu ĝin al **Manuela** aŭ **Roĉjo**.


---

**Jes, mi interesiĝas pri KKPS 2013, informu min tuj, kiam liberiĝos loko aŭ pretos aliĝilo!**

Nomo: ________________________________________________ Aĝo: ________

Loĝlando: ____________________________________________________________

Retadreso: ___________________________________________________________



# Pos-Amiko

**Printempo 2013, Numero 4**

## INDEKSO:


- Kuko dividas estraron kaj komitaton de TEJO..........1
- IJFonduso enkondukas reformojn.........................2
- Esperantisto de la jaro lanĉas revolucion en Esperantujo.....................2
- Malmultaj novaj denaskuloj pro TEJO-kondomoj.........3
- El la tombo de Zombenhof.......................3
- Horoskopo........................3
- EVENTOJ…………........…. 4


## Kuko dividas estraron kaj komitaton de TEJO

Sabaton la 9an de marto, posttagmeze, dum sia kunveno en Novara (Italujo), la estraro de TEJO faris ion, kio neeviteble vekos plurajn diskutojn kaj dividos la esperantistaron. Koko Poso esploris la temon, kaj raportas pri la evento kaj la reagoj, kiujn ĝi estigis en Esperantujo.

La proponon prezentis la TEJO-oficisto M.R., kiu tuj post la tagmanĝo informis pri la ekzisto de kuko, memfarita de ŝi, preta por esti manĝata de la Estraro. La ebleco ŝajnis alloga al kelkaj, dum aliaj montriĝis pli hezitemaj. Tiam P.F.K., ĝenerala sekretario kaj eksa gvidanto de la "Komisiono pri ŝanĝo de regularo kaj reglamentoj", komentis: "Mi ŝatus atentigi vin ke la Komitato estas la suverena organo de la asocio, kaj laŭ nia nova reglamento ni devus nun voĉdonigi ĝin". Pro la urĝeco de la kazo, oni tamen decidis eksterordinare malplilongigi la postulatajn 28 tagojn por voĉdonado, kaj anonci rapidan, unutagan retan voĉdonon.

Post la sendo de la mesaĝo, komencis elverŝiĝi la reagoj en la komitata listo, kaj ne nur tie. En la retejo de Libera Folio tuj aperis artikolo titolita "Skandala kuko minacas la sorton de la junulara movado", kaj grupo de aktivuloj eklanĉis kampanjon por bojkoti la manĝon de kukoj dum E-kunvenoj, kiu klare montras malrespekton al la monda malsato. Ĉeĥa komitatano B.M. skribis retpoŝtan komenton, sed tiu ĉi Pos-Amiko ne havas sufiĉan spacon por publiki ĝin. Komitatano C, kaj estro de la firmao Kosmo, F.M. deklaris: "Mia firmao pretas disponigi al vi la servon pri pretigado de kukoj dum sekvaj kunvenoj, kondiĉe ke 30% de la kuko restu al ni". Kritikema blogistino S.B. komentis en sia blogo: "TEJO fuŝas kaj ĝia kuko estas aĉa." V.P., en mesaĝo al la TEJO-estraro, plendis: "Kial vi ne informis la homojn pri la kuko?

Eble iuj interesiĝas pri ĝi, sed ne scias pri ĝia ekzisto. Mi ŝatus ke TEJO estu pli travidebla, ĉu estas ie publikigitaj la ingrediencoj de la kuko? Kaj mi ankaŭ volas proponi kunlaboron kun Muzaiko. Ĉu iu ekzemple pretus laŭtlegi la recepton?".
Fine estraranino pri Landa Agado, ne povis ne esprimi sian ĉagrenon pri la situacio: "Mi ne ŝatas tian sintenon", ŝi diris, sed fine Ł. Ż. , prezidanto de TEJO, revokis ĉiujn al la ordo: "Bone, ni daŭrigu."

## Volontuloj serĉataj!

La Akademio Internacia de la Sciencoj serĉas volontulojn por eksperimento pri ligo inter vino kaj ebrieco. Kontaktu d-ron B. Telo.

## IJFonduso enkondukas reformojn

Inter la multaj stipendioj, interŝanĝoj kaj konkursoj por ebligi partoprenadon de malpli riĉaj esperantistinoj al renkontiĝoj, la IJFonduso estas unu el plej sukcesaj. Ekde 2007 ĝi ofertas al kutime tri orienteŭropaninoj lokon en la paska renkontiĝo de la Itala Esperanto-Junularo. Por la sekva jaro la IEJ-estraro planas ŝanĝojn por malfermi la konkurson al pliaj partoprenantinoj. Nenomita estrarano komentas: ”Karaj, mi havas anoncon. Ĝis nun la gajnintinoj ricevis dormlokon en amasloĝejo, sed ekde la sekva jaro ni atendas, ke ili memzorge trovu dormlokon ĉiunokte. Anstataŭe la stipendio nun inkluzivas kelkajn senpagajn alkoholajn trinkaĵojn. Per tia ĉi ŝanĝo ni povas disdoni la IJFonduson al pli da gajnintinoj, kaj tiel fari la IJF-on eĉ pli internacia!”
Interesiĝantinoj por la sekva jaro sendu siajn nomon, foton kaj motivigan filmeton al ijf.admin@esperanto.it.

## Esperantisto de la jaro lanĉas revolucion en Esperantujo

La genio de Peter Baláž, por kiu la titolo 'Esperantisto de la jaro' estas plene malsufiĉa rekono, estas konata jam delonge, sed en 2013 nova pinto atingiĝis: tiam li prezentis al la mondo la 'kruel-imposton', revolucia maniero por ŝanĝi la mondon en laŭeble malplej ĝena aŭ ofenda maniero. Kaj kiel tiom ofte en historio tiu ĉi bona ago instigis aliajn je bonaj agoj.

La organiza teamo de IJS anoncis la naft-imposton, per kiu ĉiu partoprenanto, kiu ne alvenas per trajno aŭ biciklo, pagos pli altan programkotizon kaj tiel kontribuas al la sukceso de la aranĝo. Poste la teamo de KKPS enkondukis krip-imposton por ĉiu farita foto, kaj la IJK en Israelo pripensas kruel-imposton por germanoj. Antaŭnelonge la organiza komitato de MELA oficiale prezentis sian unuan skizon de estonta vestaĵ-imposto, kaj la estraro de UEA konsideras la neceson de akuzativ-imposto dum Universalaj Kongresoj.

Plej interesa estas tamen la decido de FESTO pri fermitajkruroj-imposto, laŭ kiu aliĝintoj, kiuj antaŭ la renkontiĝo jam estas en amrilato, pagas pli multe. Alekĉjo klarigas: ”Oni devas teni siajn [eblecojn] malfermaj.”

Ni troviĝas nur en la komenco de tiu ĉi revolucio, kaj restas por vidi, kiajn aliajn mondŝanĝantajn impostojn ankoraŭ elpensos la esperantistoj. Certas tamen, ke sen la brilo de la Esperantisto de la Jaro ĝi eĉ ne ekzistus nun.

## Malmultaj novaj denaskuloj pro TEJO-kondomoj

Reprezentantoj de Esperanto-familioj koleras al TEJO pro ĝia agado dum la pasinta JES. La tiam disdonitaj TEJO-kondomoj aktive malhelpas al la kreado de novaj denaskuloj. "Kial TEJO senpage disdonus ilojn, kiuj malebligas la kreadon de novaj esperantistoj en la TEJO-aĝo? Nur freneza menso povus elpensi tion". La TEJO-estraro ankoraŭ ne respondis, ĉar ili estis tro okupitaj pri kuko.

## El la tombo de Zombenhof

Malnovaj fenomenoj ofte reaperas sub nova nomo. En tiu ĉi jarcento, ĉefe en Esperantujo, mi ofte legas pri pluramemo. Kvankam ĝiaj ideanoj ĝin ofte prezentas kvazaŭ ion novan, jam en la deknaŭa jarcento mi kreis vorton por tio: friponado.

Kompreneble en tiu ĉi epoko sen privateco homoj ne plu kaŝas sian agadon, kaj ankaŭ la ekzisto de kondomoj (pri kiu TEJO min atentigis) ja forigas obstaklojn, kaj.. nu, mi perdis mian orginalan punkton. Fakte, mi envias la nuntempajn junulojn. Mi kreis tutan lingvon por konkeri unu koron, kaj ili senpene havas pliajn! Fraŭlinoj skribu al L.L. Zamenhof, Okopowa 49/51, Warszawa PL.

*-Lazaro Zombenhof*

## La horoskopo

**Ŝafo:** Vi parolos frazon en flua senerara Esperanto, sed neniu ĉeestos por aŭdi.

**Taŭro:** Ne paniku.

**Ĝemeloj:** Pasko estas bona tempo por ovoj, sed eĉ pli por ovlikvoro.

**Kankro:** Ne iru naĝi dum IJF sen dika lana bankostumo!

**Leono:** Atentu ankaŭ pri decaj italoj en bone lumitaj trinkejoj!

**Virgulino:** Post la ricevo de la IJFonduso vi ne plu estos.

**Pesilo:** Via Pos-Amiko senkiale ekbrulas kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

**Skorpio:** Vi trovos amon. Ĝi estis en la poŝo de via alia pantalono.

**Aleks Kadar:** Vi trovos kuracilon kontraŭ epidemia singultado.

**Sagitario:** Vi malkovros, ke pli allogas mamo ol papo.

**Kaprikorno:** Vi ekdormos dum vendreda meso kaj vekiĝos tri tagojn poste.

**Akvisto:** Post la dikigaj italaj manĝoj via patrino gratulos vin je via gravedeco.

**Fiŝoj:** Vi lernos tokiponon por havi sekretan lingvon, sed ĉiuj viaj amikoj jam parolas ĝin.